

Kulturaj Kajeroj

É.MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

JANUARO - FEBRUARO

1977 1

KULTURAJ KAJEROJ

1977 JANUARO-FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Naskiĝo de Islanda Ŝtato

Gotika katedralo

Homoj kaj bestoj

Pri la olivarbo (fino) J.-P. Beau

Poemoj trad. J. Petrin

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

El Grésillon

La informpetoj alvenas laŭ la ritmo kutima en tiu periodo. Sed ŝajnas, ke timigas la esperantistojn la vorto « pedagogio », ĉar la printempa periodo ankoraŭ ne ricevis eĉ mezan sukceson. Ni scias, ke bedaŭrinde la dato ne konvenas al la pli multo el la eksterlandaj esperantistoj. La lernej-libertempo ne koincidas en ĉiuj landoj. Sed se tio malhelpas la venon de instruistoj kun gelernantoj por la infanrenkontiĝo, estus eble por esperanto-instruantoj, kiuj ne estas profesiaj instruistoj, kiuj ne disponas pri grava instrumaterialo, veni dum tiu printempa periodo kaj diskuti pri metodoj, ekzerci kelkajn, vidi kion oni povas fari per magnetofono, bildo, felto panelo, aŭ simple per voĉo kaj gesto. Ĉar bedaŭrinde ne multaj instruantoj povas havi aŭd-vidan materialon.

Ni esperas, ke la someraj periodoj ricevos la kutiman sukceson. Vi scias, ke atendas vin en Grésillon prelegoj, kursoj diversnivelaj, ekskursoj en tre bela regiono, agrablaj distraĵoj. Ĉijare, se alilandanoj estas interesataj, ni « revivigos » la Diplomon de Grésillon. Pro tio, ke fine de la diversaj periodoj (ĉi-jare fine de la dua kaj de la tria periodoj) okazas sesio por la ekzamenoj de la Franca Esp.-Instituto, antaŭ dekkvino da jaroj la pedagogio-komitato de la Esperanto Domo decidis organizi specialan ekzamenon, kiun povus provi la ne-francaj ĉeestantoj. Ĝi konsistis el skriba provo : dek demandoj pri du verkoj studitaj ; parola parto el du provoj : klarigo de gramatika punkto, kiel en meznivela kurso, kaj diskuto pri teksto ĵus proponita.

Se ni ricevas sufiĉe da demandoj de interesatoj, ni povos denove organizi tian ekzamenon. Do, skribu al ni !

La Esperantista Kulturdomo deziras al la legantoj de Kulturaj Kajeroj ĝojon kaj sanon por la nova jaro.

ĈU VI MEM AŬDIS ?

La 24-an de januaro 1977, Radio-Bern (Svisa Kurtonda Radio — Esperanto-fako) bonvolis atentigi sian aŭdantaron pri la Jubileo de Grésillon, ankaŭ ripetis la saman elsendon la sekvantajn 25 kaj 27-ajn de januaro.

D-ro Baur, ĉe la komenco diris. ke raporti pri la diversaj esperantistaj aranĝoj ne estas la tasko de la Berna radio-programo, sed hodiaŭ li faras escepton por paroli pri la Esperantista Kulturdomo Grésillon. Sekve, li dediĉis preskaŭ du minutojn inter la dek kiuj konstitigas la programon por informi pri la 25-jara jubileo kaj li aludis pri la belega kastelo, pri ĝia geografia situo, la preciza adreso poŝta al kiu oni devas sin turni por kontakti la administranton. Li ankaŭ forte akcentis la familian etoson kiu regas en la Kulturdomo.

Koregan dankon al Radio-Bern kaj D-ro Baur pro tia bona prezento.

Esperanto tra la Mondo

La universala kongreso preparigas en Rejkjavik

— La islanda ŝtatprezidanto, D-ro Kristjan Eldjarn, alta protektanto de la kongreso, konsentis ĉeesti persone la solenan inaŭguron kaj akceptos reprezentantojn de la kongreso en la prezidanta rezidejo.

— La ĉeftemo de la kongreso estos : « La rajto je komunikado ».

— La turismaj ekskursoj estos speciale multnombraj kaj variaj. Krome, pluraj postkongresoj estos elekteblaj (eĉ flugvizito al Gronlando).

— Antaŭkongreso en Skotlando : ĝi okazos en Stirling (26-29a de Julio), kun ebleco de foriro de Glasgovo al Rejkjavik. Prelegos William Auld, Marjorie Boulton, Albert Goodheir.

— Meze de Januaro, estis jam pli ol 750 aliĝintoj por tiu malproksima universala kongreso, en interesega lando.

Aliaj kongresoj kaj renkontoj (...nia dua listo)

— 23a Internacia Esperanta Ferio-Semajno, en Krommenie (Nederlando), 7 — 14a de Aŭgusto. Adreso : S-ino B.v.d. Pol-v. Eijk ; Teresjkovastraat 15, Krommenie.

— Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco, en Krakovo (Pollando), 13 — 17a de Julio. Informas : W. Opoka, ul. Grzegorzecka 20, PL-31-531 Krakow, Pollando.

— Internacia Katolika Kongreso (de I.K.U.E.), en Ĉenstohova, Pollando, 17 — 21a de Aŭgusto, kun antaŭkaj post kongresoj. Informas Frateca Informejo Katolika, P. Stanislavo Ruchala, J. Krasickiego 6, 33 — 100 Tarnow, Pollando.

— Kongreso de la francaj katolikaj esperantistoj, en La Houssaye-en-Brie, 9 — 11a de Aprilo (Pasko). Adreso : F-to R. J. Marmou, Prieuré St-Martin, La Houssaye-en-Brie, 77610 Fontenay Tresigny.

— Itala kongreso de Esperanto (ĉiam larĝe internacia), en Campobasso (2 — 10a de Septembro). Adreso : Ente Provinciale per il Turismo, Piazza Vittoria 14, 1 — 86100 Campobasso, Italio.

— Internaciaj Feriaj Esperanto-kursoj, en Helsingör, Danlando, 24 — 30a de Julio. Adreso : S-ino Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK — 3000 Helsingör, Danlando

— Internacia konferenco de la esperantistaj instruistoj, en Luksemburgo, 14 — 24a de Julio. Temo : « La kultura valoro de Esperanto ». Adreso : ILEI, Casella Postale 22, I 54100 Massac, Italio.

— 10a Internacia renkontiĝo por naturamikoj, en Abaliget (Hungario), 10 — 19a de Julio. Informas : H.E.A., pf. 2, H — 7601, Pecs, Hungario.

La Teatro Esperanta de Parizo en la Junulkongreso de Poitiers

Oni anoncas en la programo de la Junulara kongreso, en Poitiers, Francio (9 — 16a de Aŭgusto), krom aktualaj debatoj, ekskursoj, ankaŭ teatran kaj kabaretan vesperon kun TESPA (Teatro Esperanta de Parizo).

Se vi deziras inviti aŭ rilati kun tiu nova sed valora teatra trupo, skribu al Sylvie Gaspard, 10, rue Georges-Dupont, 95870 Bezons, aŭ al G. Lagrange, 48, avenue de la Division Leclerc, 95350 Saint-Brice-sous-Forêt, Francio.

Alvoko de Internacia Esperanto-Centro de la Mondcivitanoj

Tute nature, la faka asocio de mondcivitanoj esperantistaj, devus altiri la atenton de multaj disĉiploj de Zamenhof. Ĝi eldonas bultenon kaj laboras en medio ĝenerale favora al nia movado. Adreso : S-ino Volpelière, 3, rue Rouget de Lisle, 3000 Nîmes, Francio. Ĝi atentigas la interesitojn pri la diversaj manifestacioj de mondcivitanoj, dum la dek unuaj tagoj de Julio en Parizo.

Novajoj pri la esperanta literaturo kaj pri ia eldonajoj

— Verŝajne en 1978, U.E.A. reeldonos la reviziitan kaj kompletigitan verkon de Kalocsay kaj Waringhien : « Plena analiza gramatiko de Esperanto ».

— U.E.A. ankaŭ eldonos la poemaron de Kalocsay « Izolo » kaj « Esperanto kaj lingvistiko » de D-ro J. C. Wells.

— En Hungario, oni publikigis lasttempe broŝuron kiu entenas 10 poemojn de la elĉerpita verko « Streĉita kordo » de Kalocsay. Oni nun anoncas la baldaŭan reeldonon de « Koko krias jam », de Szilagyi ; « De paĝo al paĝo » de Totsche ; « kvaropo » de niaj skotaj poetoj. Krome aperos « En la maskobalo » (originalaj unuaktaĵoj de Baghy).

— Post konsento inter S-ro J. Regulo kaj S-ro Kehlet la publikajoj de la eldonejo « Stafeto » translokiĝos de Kanariaj Insuloj al Danlando. Laŭ moderna rimedo, oni reeldonos nian « klasikan » romanon : « Metropoliteno » de Varankin kaj tiel, eble povos fine aperi la originala romano de John Francis : « La granda kaldrono ».

— La revuo « La monda lingvo-problemo » daŭrigos sian ekziston sub la nova nomo : « Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado ». La titolo, krom en Esperanto, aperos sur la kovrilo en pluraj naciaj lingvoj. Daŭre estos esperantlingvaj resumoj de la artikoloj kaj la redaktoro restas Prof. Richard E. Wood, el Usono. Abono : 30 nederlandaj guldenoj por tri numeroj.

— Jus aperis « Facetoj de Esperanto » (3 eseoj pri la lingvo) de William Auld, « Naskitaj sur la minoj — okinavo », originala romano de la konata japano Niyamoto Masao.

Du lingvaj seminarioj en Novjorko

Denove, dum la finjara kongreso de Modernlingva Asocio de Usono, okazis du seminarioj rilate al Esperanto. Tiufoje, la temo de la kutima seminario « Esperantaj lingvo kaj literaturo » estis : « La populara literaturo en Esperanto, kun aparta atento al R. Schwartz ». Inter la prelegintoj estis la ambasadoro Ralph L. Harry. En la seminario « Interlingvistiko », oni diskutis kvar referajojn. La venontaj seminarioj okazos fine de 1977, en Ĉikago.

Junaj esperantistoj el 23 landoj komencis la jaron en Germanio

132 junaj geesperantistoj el 23 landoj ĉeestis la seminarion de Germana Esperanto-Junularo, en Sensenstein, de la 27a de Decembro ĝis la 3a de Januaro. Denove granda sukceso por tiu-jara seminario.

Naskiĝo de la Islanda Ŝtato Groenlando - Vinlando

Komence de la 10-a jarcento, la koloniantoj formis kamparajn klanojn, ĉirkaŭ la religia ĉefo, la « godi ». Por solvi siajn malpacojn, la klananoj kunvenis en asembleoj nomitaj « Thing ». Pro la ĉi-tieaj naskiĝoj, pro la alvenoj de novaj enmigrantoj, montriĝis necese krei pli imponan asembleon. En 928, Ulflojt alportis el Norvegujo la Islandan Leĝon. En 930, kunvenis la Althing, praulo de ĉiuj parlamentoj ; ĝi sidis apud la lago Thingvallavatn, en vasta ebenaĵo, ĉirkaŭita je vastaj lafo-kampoj kaj protektita je krudaj klifoj, kiuj resendis samtempe la parolojn kaj la unuajn sunradiojn. Dum pluraj jarcentoj 39 « godi » (pli poste 51) kunvenis ĉi tie, fine de junio[e]; ĉiufoje la Recitanto, elektita por tri jaroj sed ofte reelektita, recitis unu trionon de la Leĝo (ankoraŭ ne Skribita) kaj ĝin interpretis.

Tiu grava evento estis ankaŭ populara festo : alvenis al Thingvellir ne nur la ĉefoj religiaj kaj politikaj kun siaj parencoj, amikoj, servistoj ; ne nur tiuj , kiuj havis aferon raportindan al la Alta Asembleo, sed ankaŭ ĉiuj, kiuj deziris renkonti ĉi tie amikojn, vojaĝantojn, ekscii novaĵojn, elmontri sian mizeregon aŭ sian riĉabundecon, serĉi brutaron, vestojn, galanteriojn aŭ edzigotan junulinon antaŭ ol reiri al siaj erikejoj, al siaj dezertoj, al siaj glaciejoj, al sia soleco. La festo daŭris 15 tagojn ; oni trinkis bieron, oni partoprenis ludojn, oni aŭdis la rakontojn de la skaldoj, kiuj poste nutros la unuajn sagaojn.

En 965 unua Konstitucia Revizio partigis la landon en 4 distriktojn de ĉiuj 3 (4 en nordo) « thing » (ĉiu thing entenis 3 komunumojn). La « godi », estro de antikva familio, iĝis pli kaj pli potenca. En tiu ĉi tempo, la moroj estis brutalaj : al la dioj oni buĉoferis brutojn, ĉevalojn, sklavojn (tiuj ĉi liberigitaj nur en la 12-a jarcento) ; akutaj ŝtonoj rompis la spinon de la viktimoj, aŭ tiujn ĉi oni ĵetis en la abismojn aŭ la kaskadojn. Malgraŭ la decidoj de la « thing », plejofte la kverelantaj familioj preferis la duelon por konkludi la aferon ; ofte la du luktantoj mortis. Kvereloj, monpunoj, atakoj, murdoj naskis terurajn malamojn, vendettojn, kiujn oni ne povis eviti ; la malkuraĝulo estis malestimita kaj persekutita de ĉiuj. Tiuj vendettoj, pri kiuj parolas la Sagaoj, senhomigis la familiojn.

La plej grava puno, fare de la thing, estis la Ekzilo, portempa aŭ porĉiama. Se la proskribito sukcesis fuĝi for el la insultoj, la postkuradoj, la batoj, li devis fronti la ŝtonajn aŭ glaciajn dezertojn, la malvarmegon, la 6-monatan nokton. La Sagaoj elvokas liajn ekstremajn angorojn, la viron venkitan de sia propra fantomo ; tiu fantomo, kiu daŭre vagas en la erikejoj, starigas la harojn de la ĉevaloj, malbenas, ploregas, petegas pri iom da fajro.

Al konkero de Groenlando

Erik la Ruĝulo (kun ruĝaj barbo kaj haroj), kies familio alvenis Islandon ĉirkaŭ 960, kverelis kun siaj najbaroj. Li mortigis kelkajn el ili. Oni lin ekzilis por tri jaroj.

Erik estis aŭdinta malnovajn rakontojn : 80 jarojn antaŭe, iu Gunnbjörn, portita de la ondoj al sunsubirejo, malproksime de la Islandaj bordoj, estis ekvidinta novan teron. Cetere, okaze de hela vetero, oni vidis la hirtiĝojn de nekonata lando.

Erik estis certa, ke tiuj bordoj lin atendas. En majo-junio 928, li forlasas Islandon. Li navigas okcidenten kaj nord-okcidenten direkte al la montoj, kiujn li ekvidas. Li luktas kontraŭ ventoj, fluoj, glacimontoj ; fine atingas akcepteman teron, ŝirmatan kontraŭ la nordaj ventoj ; ĉi tie la glaciejoj estas malproksimaj de la marbordo ; multaj fjordoj akvoj pacaj kaj fiŝ-riĉaj enprofundiĝas internen. Estas miriadoj da marbirdoj, molanasoj, cignoj, blankaj perdrikoj ; krutoj plenplenaj je nestoj ; ursoj, boacoj, mos-



kaj bovoj, fokoj, rosmaroj, balenoj ; kaj erikejoj, kiuj faros bonajn paŝtejojn. Erik esploras tiun landon, instaliĝas funde de fjordo longa je 100 kilometroj Li nomas tiun landon : La Verda Lando, Groenlando.

Kaj li reiras Islandon por serĉi virojn, virinojn, infanojn, brutarojn. En la somero 985 (au 986) 25 ŝipoj forlasas Islandon por Groenlando : kelkaj ŝipoj malaperas en la glacirompiĝojn ; aliaj reiras Islandon ; 14 ŝipoj, proksimume 500 personoj, atingas la Verdan Landon. Tiu verda lando estis enorma lando, kiu disponigis nur mallarĝan marbordon al la alvenantoj ; la cetero estis dediĉita al frosto. Ĉirkaŭ la Jaro Mil, la klimato estis pli dolĉa ol 5 jarcentojn pli poste ; tial la bredadoj kaj la fiŝadoj de Erik prosperis (40 bestoj en la farmo de Erik, 100 en tiu de Gardar) ; butero, fromaĝo, ŝaflano, boacoj, ursoj ; sed nek legomoj, nek cerealoj. La domoj estis konstruitaj el dikaj ŝton-blokoj kaj el torfo-kuboj ; la ĉarpentaĵo estis el ligno aŭ subtenata de baleno ripoj, kaj kovrita per gazono. En la plej bona periodo oni nombris 280 farmojn, 5 000 loĝantojn kaj eĉ pli, kapelojn kaj preĝejojn kaj eĉ, en 1126, unu katedralon kun vitraloj el vera vitro.

En 1261, Groenlando, kiel Islando pasis sub la regadon de la Norvega Krono ; ŝipoj alvenis el Islando, Britujo, Hansaj landoj ; ili alportis feron, ilojn, armilojn, tritikon, sukeron, malton, medikamentojn, librojn ; ili forportis peltojn de polaj vulpoj, de blankaj ursoj, ledon de fokoj (tiun ĉi oni uzis por fari laĉojn kaj plektitajn ŝnurarojn grand-rezistaj) eburon de morso kaj baleno, blankajn falkojn orgojlon de la reĝaj kaĝegoj ; fine la faman kornon de unukornulo, kiun hodiaŭ oni diras esti la dento de narvalo.

Kaj montriĝis la unuaj efektoj de glacia ondo ; el nordo, forpuŝitaj de tiu frosto-ondo alvenis la Eskimoj ; kaj pli kaj pli maloftiĝis la interkomunikadoj kun okcidenta Eŭropo.

5 jarcentojn pli poste, ĉirkaŭ 1510 (estis en la tempo de Karolo la Kvina kaj de Francisko la Unua) unu hansa komerca ŝipo, kiu navigis inter Hamburgo kaj Islando, devojiĝis, pro la tempesto ĝis Groenlando ; ĝi eniris en fjordon ; la ŝipistoj surteriĝis por kolekti ovojn ; ili trovis « domojn ŝipformajn» kaj ŝtonmurojn, kiuj similis tiujn de Islando ; Kaj meze de tiuj ruinaĵoj, kadavron de blanka viro ; li havis veston el foka ledo kaj malglata lano kun kapuĉo bone kudrita ; tute apude, ili trovis kurban tranĉilon kun ĝia ingo ; ĝia klingo estis preskaŭ tute eluzita pro la multaj akrigadoj. Tiu mortinto, sen tombo, estis la lasta posteulo de la kunuloj de Erik la Ruĝulo. La kolonio iom post iom estis glitinta al sia tuta neniiĝo.

Al Vinlando

La Islandaj Vikingoj aŭ Keltoj, grand-aventuremuloj, daŭrigis siajn navigadojn al Okcidento. Herjolf estis kunulo de Erik la Ruĝulo. Ĉirkaŭ 986, Bjarni, filo de Herjolf, forlasas Islandon por reatingi sian patron en Groenlando. Neesto de vento, ĉeesto de nebulo, devojirigas la ŝipon. Kiam la suno reaperas la ŝipistaro malkovras, sur la okcidenta horizonto, nekonatajn terojn. Sed la ŝtormo, kiu ekblovas forpuŝas la ŝipon orienten, ĝis Groenlando.

Estas en tiu epoko, ĉirkaŭ la Jaro Mil, ke la reĝo Olaf de Norvegujo ordonas, ke Leif, filo de Erik, anoncu Kristanismon en Groenlando. Estas la edzino de Erik, Thjodhild, kiu konstruigas la unuan malgrandan kapelon, apud kiu estis entombigitaj, kudritaj en bovo-ledo, la unuaj kristanoj de Groenlando : la kunuloj de Erik, Thjodhild, Erik li mem, kaj la Malkovrintoj de Vinlando. Unu unua generacio de ĉi-tieaj naskiĝintoj ĵus atingis adoleskecon ; 15 jarojn post la aventuro de Bjarni, Lief, inda filo de Erik, entreprenas kun 35 kunuloj, vojaĝon al Okcidento. Ili malkovras la terojn priskribitajn de Bjarni : jen la Insulo kun Plataj Ŝtonoj : Hellulando, probable la Tero de Baffin. Pli malproksime jen Marklando, la Lando de la Arbaroj (Labrador). Ankoraŭ du taga kaj du nokta navigado kaj aperas nova tero, ĉe enfluejo de rivero en kiu naĝas enormaj salmoj ; herbo alta kaj densa kreskas sur ĝiaj bordoj. La vojaĝantoj decidas ĉi tie travintri ; ili konstruas kabanojn ; ili esploras la landon. Tyrkir, la germano, la malnova kunulo de Erik, malkovras « la viton kaj la vinberojn ». Ili nomas tiun landon Vinlando. Estas la amerika marbordo, apud Boston.

En printempo ili reiras Groenlandon. Leif anstataŭigas Erik kaj iĝas ĉefo de la komunumo. Li ne plu aventure vojaĝas. Sed multaj navigistoj reiris al Vinlando ; multaj vojaĝoj pri kiuj parolas la Sagaoj.

ANTAŬ - R.I.D.E.F 77

Ĝi okazos en Artigues près Bordeaux (Maison de la Promotion Sociale), Francio, de la 2a ĝis la 14a de julio 1977. Same kiel dum la pasintjara en Grésillon, eblos al la partoprenantoj eklerni Esperanton aŭ progresi en lingvo-uzado dank'al diversgradaj Esperanto-kursoj ; ankaŭ prepari sin por fruktodona laboro dum la tuja R.I.D.E.F. (1) per kunlaborado en diverstemaj laborgrupoj. Krome, tiean restadon agrabligos distraĵoj (ludoj. kantoj, ekskursoj, eblecoj por sportumado...).

Eĉ kiuj ne povos poste partopreni en la R.I.D.E.F. sed tamen deziras plibonigi sian kapablon en Esperanto-uzado, tiuj rajtas partopreni en la Antaŭ-R.I.D.E.F., kie ili estos bonvenaj.

Konsilinde estas ĉeesti dum la tuta daŭro (12 tagojn). Tamen eblos partopreni nur parte laŭ periodoj sestagojn daŭraj, ĉu de la 2a ĝis la 8a, ĉu de la 8a ĝis la 14a.

Por ricevi detalajn informojn, la interesatoj bonvolu tuj skribi al : Léo ROBERT, 11 rue des frères Lumière, 33150 CENON Francio

Ne atendu ! Ju pli frue, des pli sekure por certe ricevi lokon.

---

(1) **R.I.D.E.F. = Internacia Renkontiĝo de Freinet-Edukistoj (Lisbono — 1977).**

GOTIKA KATEDRALO

Paolo Giovio pensis, ke civilizacio, arto kaj literaturo eliris el la « gotaj tomboj » en kiuj ili estis de longa tempo. Fakte en la ellaborado de la okcidenta civilizacio apud la klasikaj kaj latinaj fontoj, aliaj elementoj venis el Oriento kun tiu Gota tribo, kiu, en la 3-a kaj 4-a jarcentoj, invadis la Romian Imperion kaj fondis reĝlandoin en Italujo, Francujo kaj Hispanujo.

Interne de la Grandaj Gotikaj Navoj du impresoj sin trudas : fizika sensaĵo kaj spirita emocio, naskiĝintai el la vertikala impeto de la linioj kaj de la envolvada heleco. Neniu povas ilin ne sperti. Kontraŭe al la romanika baziliko, larĝe apogita sur sia bazo, kaj forte kuntirita sur si mem, la gotika katedralo estas « staranta konstruaĵo ». Kontraŭe al la peza duoncirkla lulilvolbo, kiu trudas la enormecon de la muroj, kiu mallarĝigas la fenestrojn kaj malheligas la navon laŭmezure ke la preĝejo grandiĝas, la gotika tekniko vokas la lumon, kiu trairas la tutan konstruaĵon kaj instaliĝas en ĝi.

Ne estas tiuj spiritaj donitaĵoj, kiuj unue kondukis la labor-majstrojn : baze de ĉiu granda arta fakto, ĉiam troviĝas teknika inventaĵo. La ogivo, kiu permesas al la gotika katedralo ekzisti, ne entenas en si mem religian signifon (cetere ĝi same kovras iajn ĉambrojn, kelojn, dormejojn) ; la ogivo estas tute ne sinonimo de « rompita arko » ; tiu arko-formo, tiel eleganta ĉe la aperturoj de la preĝejo, kiel ĉe la galerioj de la klostroj, estas formita de du cirklo-segmentoj kuniĝantaj laŭ angulo pli malpli akuta ; ĝi jam ekzistis, en la romanika epoko, najbare kun la duoncirkla arko ; la ogivo-kruciĝo (la ogivo, kiu fermiĝas, kiel oni kunmetas la manojn) permesis solvi, pli bone ol la romanika volbo, la kovraĵon de la navo.

La spano, ordinare kvarangula, estis difinita de kvar pilieroj ; de unu piliero al la alia, oni ĵetu arkon ; la du diagonalaj arkoj kruciĝas X-forme ; ĉe la junto-punkto, ŝtono, skulptita kiel trifolio kun kvar folieroj, ilin kunigas ; estas la volbo-ŝlosilo ; en la kvar sekcoj voûtains), de unu arko al la alia, oni povas instali kovraĵon el malpezaj materialoj ; tiu tekniko konsiderinde malpezigis la volbon ; oni povos ĝin altigi, tiom, kiom oni volos ; la muroj malpli dikaj, povos ricevi fenestrojn.

La nura problemo estis plifortigi la pilierojn, kiuj subtenas la volbon ; kiam muro minacas fali, oni ekstere aldonas al ĝi trabon oblikve apogitan ; estas la apogarko, kiu baziĝas sur la peza maso de la mur-apogilo, fortike enprofundigita en la grundo ; eĉ, sur la apogarko oni starigis la pinaklon en formo de sonoriltureto. Estas unu el la paradoksoj de la gotika katedralo : doni impreson de leviĝo al la ĉielo dum ĝi peze enprofundiĝas en la tero ; dum oni miras antaŭ la malpezeco de la tutaĵo, oni ne devas forgesi, ke tiu fantasta arabesko baziĝas sur enorma fundamento enigita ĝis 15 metra profundeco. La ĝusteco de la dimensioj, la desegno de la pilieroj, la perfekta kurbo de la apogarkoj, faras la katedralon « geometria desegnaĵo vestita de Beleco ».

Kiam la problemo de la kovraĵo estis solvita, la navoj altiĝis, eĉ ĝis ekster singardeco. Laŭ la elementa leĝo de la proporcioj la navoj longiĝis, larĝiĝis, multiĝis · trioblaj, kvinoblaj navoj « kondukis la popolamasojn, laŭ triumfaj avenuoj, ĝis la altaro ». La sonoriloj, kvazaŭ transportitaj de la supreniranta forto, kiu altigis la konstruaĵon, atingis altecon ĝis tiam neniam atingita (Reims, 82m —Chartres, 123m —Strasbourg, 142m —Ulm, 160 m). Tamen tiu arto, kiu restis profunde humana, neniam estas kolosa aŭ senmezura.

Kie oni konstruis la unuan ogivo-kruciĝon ? ĉu en Britujo, jam de 1093 en Durham, Peterborough ? Ŝajnas, ke la plej multo el la provoj situas inter la riveroj Somme Oise kaj Ile de France : malriĉaj preĝejoj en Cambraime, Araines, abatejo de Morienval en Compiègne-arbaro (1115). La plej grava provo estas St-Denis en 1144 · Suger raportas, ke, dum la inaŭgurado, la arkoj novmanieraj, konstruitaj sur la ĉirkaŭo de la ĥorejo « estante nefinitaj, kaj subtenataj de neniu portilo nek apogilo, tremis dum subite furioziĝanta ŝtormo ». Ĉar la problemo de la volbo estis solvita, la kreantoj, generacio post generacio, alcelis la ĉefverkon. Sufiĉas kompari Fontenay, Pontigny kaj Fontfroide (en kiuj la cistercia severeco tiel noble konvenas al la strikta tekniko de la primitiva gotika arto) kun la perfektaj navoj de Amiens aŭ Reims, por mezuri la distancon trairitan. Jen Senlis, jen Noyon (1151-1200) kun sia triforio.

Jen Laon (1160-1207) kun siaj statuoj de bovoj, kiuj eliĝas el la turoj ; la ĝusteco de ĝiaj proporcioj, la trioblа portalo, la grand-dimensiaj vitraj fenestroj, tra kiuj eniras la lumo, faras ĝian trankvilan kaj suverenan elegantecon.

« Nia Sinjorino » de Parizo malfermas de liston de la grandaj ĉefverkoj : Chartres, Reims (1214-1300), Amiens (1220-1270) kaj iliaj « idoj » Le Mans, Bayeux, Lisieux, Evreux kaj la ĉarma Coutances.

« Nia Sinjorino » de Parizo, forta, trankvila, pripensema, bone konvenis al la genio de siaj reĝoj.

En **Chartres** la apogeo estas atingita : estas la kristana fervoro ; estas la Espero ; ĉi tie la triforio, inspirita de Noyon, konsiderinde leĝerigas la impeton de la navo, heligita per larĝaj vitraloj kaj eksterordinaraj rozvitraloj : la garboj de kolonoj, kiuj ĉirkaŭas la pilierojn, akcentas la impreson de leviĝo.

Reims estas plena je grandstilaj mirindaĵoj ; kvazaŭ lude la apogarkoj portas la anĝelojn pretajn elflugi el la pinakloj. Estas en siaj skulptaĵoj, ke Reims estas aŭdaca ; ĝi realigis ĉion, kion la gotika arto portis en si. Estas la katedralo de prestiĝo kaj gloro, en kiu la reĝoj estis konsekritaj.

En **Amiens,** la superega punkto estas atingita, kvankam la aŭdaco ankoraŭ respektas la leĝojn de la ekv-



libro : la volbo ĝis 42 metroj, la pilieroj en garboj, la muroj anstataŭigitaj per larĝaj aperturoj aĵuritaj tra kiuj fluegas la lumo, kaj, ekstere, la ekstrema facileco de la apogarkoj kaj de la mur-apogiloj ; estas la perfekteco ekskluziva de la linioj. Vere tiu katedralo estas la « geometria desegnaĵo vestita de Beleco ».

Oni devas rimarki, ke ne ĉie la gotika arto anstataŭis la romanikan ; kelkfoje ambaŭ artoj kuniĝis en admirindajn rezultojn : Le Mans kaj la ĉefverka roza katedralo de Albi.

La skulptarto « ido » de la arkitekturo

La Barbaraj Invadoj estis tute malaperigintaj la skulptarton. Tamen dum la Karolida epoko, la kapiteloj komencis ornamiĝi je stilizitaj plantoj kaj bestoj mallerte imititaj de la Bizancaj modeloj. La cizelita oraĵarto, tiam multe ŝatata, estis jam kreinta la unuajn bareliefojn ĉe la relikvaj statuoj, precipe en Aŭvernio. Ili antaŭis la ŝtonajn bareliefajn statuojn. Iom post la jaro Mil, oni timide provis ensemblojn ĉe skulptita dekoracio (Kristo kun anĝeloj en St-Denis des Fontaines en Roussillon).

Kaj la kristanaro aspiris al reliefo.

La kapitelo, de malproksime imitita de la Korinta modelo, aldonis al la dekoracio geometria, vegetala kaj besta, la homan vizaĝon ankoraŭ mallerte reprezentitan, kvazaŭ enigitan en la ŝtono. Kiam la porda aperturo malfermita en tro dikaj muroj pli kaj pli oblikviĝis de interne eksteren, la arkitektoj uzis tiun oblikvecon por starigi pilastrojn, unujn post la aliaj. Tiu mirinda genia ideo kondukis al anstataŭigo de tiuj pilastroj per statuoj. El tiu kolono-statuo naskiĝis tuta generacio de ĉefverkoj, el kiuj la « rektaj piedoj » de Chartres estas la plej antikvaj.

Rapide la skulptarto atingis la timpanon ; estas la triangulo, kun du kurbaj lateroj, kiu staras sur la lintelo de la portalo ; ĝi proponis grandan surfacaĵon por la prezentado de grandaj scenoj ; siavice la volbiĝoj estis ornamitaj.

Tiu skulptarto, kies disflorado estis mirindega, restis subordigita al la arkitekturo. La figuroj de la portalo estis skulptitaj ĉe la kolonoj, kiujn oni poste enigis en la ĝustan lokon fiksitan per precizaj krokizoj. En la komenco tiuj statuoj, kelkfoje dikritaj « naivaj », estis tiel rigidaj kiel la kolono mem.

Iom post iom tiuj statuoj elglitiĝis el la konstruaĵo ; la drapaĵoj eliĝis el la alliniigo ; la statuetoj de la volbiĝoj iĝis kvazaŭ alkroĉitaj al sia « klaviso » (claveau) ; la skulptitaj figuretoj montriĝis pli facilmovaj, pli perfektaj, pli belaj. La romanika skulptarto estas granda vekiĝo ; ĉie la vivo ĉeestas ĉie simpla kaj profunda pieco esprimiĝas en dekoracio de fantastaj bestoj, nekonataj plantoj, de sciplena geometrio. Estas la mistika arto de Vezelay, Autun, Charlieu, Moissac, Beaulieu kaj St-Benoît sur Loire (jam en 1095). Estas antikvaj revivaĵoj en St-Trophime, en St-Gilles, Provencaj mirindaĵoj. En « Nia Sinjorino de Parizo », sur la Reĝa Portalo de Chartres, lokita inter la du gotikaj turoj, estas formoj senmovaj aŭ movigitaj de gestado, kiun akcentas la tremado de la drapaĵoj.

La gotika arto forlasis la dekoracion de la kapiteloj. Tamen estas la granda ekzaltiĝo de la skulptarto. La statuaro invadis ĉion, kion ĝi povis, multobligante la statuojn, kies staturo variis inter 20 cm. kaj 4-5 metroj Oni progresis de unu laborejo al la alia ; ĉiu rezulto havigita en unu katedralo servis kiel elirpunkto en alia. La skuptistoj antaŭeniris al arto pli humana, pli vivanta : jen kapo aŭ korpo, kiu kliniĝas ; jen rideto, kiu naskiĝas ; jen genuo, kiu aperetas sub la drapaĵo. (Sens, la transepto de Chartres. Nia Siniorino de Parizo en sia timpano, Amiens en sia tuto). Estas en Reims, ke tiu arto, nesupereble, atingas facilan moveblecon kaj perfektecon.

En 1035 sinodo en Arras konsilis reprezenti la Bibliajn scenojn ; ĉar « tio permesis al la sensciuloj konatiĝi kun tio, kion ili ne povis legi ». Estis la intenco de la romanikaj kaj gotikaj artistoj. La personoj estis ĉie same reprezentitaj : la sanktuloj portis aŭreolon aŭ la torturilojn, kiuj mortigis ilin. St-Petro havis krispajn harojn, duran barbon kaj ŝlosilon en mano ; la kvar evangelistoj estis tre konataj. La zodiakaj signoj montris, ke Dio estas la Mastro de la Tempo. La skulptistoj montris ankaŭ la homon mem ; la ŝtonaj kalendaroj elvokis la monatojn kaj iliajn proprajn laborojn : estis la homo rikoltanta la tritikon, pritondanta la viton, buĉanta la porkon, varmiganta sin ĉe la fajrejo ; estis la edzo disputanta kun sia edzino, la timaĉa kavaliro forkuranta antaŭ leporo. Estis ankaŭ en Rouen ŝercaĵoj : la ansero, kiu ekzamenas urinujon, porkino kiu vjelo-ludas. Personoj reprezentis virtojn kaj malvirtojn. Plie, por ke la homa inteligenteco partoprenu tiun dian gloradon, gramatiko, aritmetiko, retoriko, muziko, estis ankaŭ reprezentitaj.

Kolor-ludoj

El ilia origina beleco la katedraloj ne estis blankaj, nek grizaj. Ekstere kaj interne la lumo ludis sur la oroj kaj sur la paletraj tonoj. La statuoj kaj bareliefoj estis unue « surŝtofitaj », precipe en la interno ; por pli bone adheriĝi la koloron, oni gluis ŝtofon sur la ŝtono ; tiu operacio estis kosta kaj aparte pagita.

La Arminiano Pierre Martyr, kiu vizitis Parizon en la **XV-a jarcento priskribis « Nia Sinjorino de Parizo »** ; li montris ĝin radianta de purpuro, lazuro kaj oro.


Kolor-ludoj ankaŭ ĉe la freskoj, la mozaikoj, la vitraloj ; ĉe tapiŝoj kaj drapiraĵoj ; ĉe la pavimo ; ĉe la liturgiaj mebloj, vestoj, libroj ; ĉe la emajlitaj relikvujoj.

Okaze de religiaj festoj, de nobelaj edziĝoj aŭ funebroj, de reĝa konsekrado, oni kunvenis en la katedralo Eĉ, dum la Grandaj Pilgrimoj, en Chartres, oni manĝis kaj dormis en la sanktejo.

Kaj en la komenco de la 7-a jarcento la Papo Sta Gregorio kreis la Gregorian kanton. Nur dum la 12-a kaj 13-a jarcentoj, Pierre le Venerable kreis la polifonian kanton, kiun la tiama Papo kaj St Bernardo juĝis ne favora al la pieco.

El la liturgio mem naskiĝis la liturgia dramo, inspirita de la skulptitaj scenoj ; ĝi estis unue organizita en la katedralo mem antaŭ ol esti reprezentita sur la preĝeja placo. El tiuj « Pasio ludoj » naskiĝis teatro.

El la libro de Daniel Rops.



HOMOJ KAJ BESTOJ

Niaj rilatoj pli malpli pasiaj kun la bestoj, realaj aŭ imagaj, kondiĉas nian tutan vivon ; mitologiaj rakontoj, sanktaj paraboloj, fein-rakontoj, revoj, fantazioj, simbole kaj ofte poezie, esprimas aŭ malkaŝas tiujn rilatojn.

La unuaj objektoj, kiujn la juna infano interŝanĝas kun la mondo, ekster la patrina medio, estas la bestoj. Pli ol la homo forma pupo, li preferas la plušan urson, kiu lin trankviligas kaj endormigas. La bestoj estas la kompanoj, realaj aŭ fikciaj de nia infanaĝo : ludiloj, fabeloj, fabloj, vivantaj desegnoj, eĉ por la urbaj infanoj.

Kiel klarigi tiun saltegon antaŭen, tiun momenton dum kiu, per biologia neklarigebla procezo, nia cerbo akiris la plian neŭronon, kiu kreis la Homenon, elirigis lin el inter la primatoj, lokis lin, ne plu meze de la bestoj, sed kontraŭ ili ? De tiam la Homo estis devigata partigi la mondon kun la bestoj. Precizigi, en la tempo, la aperon de la Homo Sapiens estas des pli malfacile, ke oni ne scias je kiu intelekta grado la Homo meritas tiun nomon. Se, en la premsonĝoj de la tre juna infano, kiu ankoraŭ ne vidis bestojn, oni povus malkaŝi le ĉeeston de la « Cervus Megaceros » (la giganta glacia cervo), aŭ tiun de la gliptodonto (tatuo 3 m-longa), oni scius, ke, antaŭ 200 000 jaroj la homo registris tiujn bildojn kaj estis kapabla ilin memorigi kaj heredigi al la venontaj generacioj siajn emociojn. Ĉu, ĝis ni, tiu frapo-ondo povus alveni ?

La Homo devenas de la kvarpiedulo. Kiel ĝi, li lernis stariĝi por kolekti foliojn kaj fruktojn manĝeblajn. Li levis sian rigardon kaj sian penson (jam simio kaj urso estis pli inteligentaj ol la aliaj bestoj). Kiel ĉe la simio, ĝia piedo iĝis prenebla kaj iom post iom transformiĝis en manon. Mirigas nin la perfekta simileco inter la feto de simio kaj la feto de homo : sama orelo, sama malsupra makzelo, sama piedo (ankoraŭ ne prenebla), sama manko de haroj ; ĉiuj tiuj similaĵoj malaperas kiam la 3-monata simio-feto iĝas vivopova ; ŝajnas ke la homo senmoviĝis en tiu stadio, kiam lia vivo estis nur ensemblo de eblecoj, nur proksimuma projekto, nur revo ; ĉu la malpli rapida malmoliĝo de nia kranio igis ebla la kreskadon de nia cerbo ? Niaj revoj la plej kutimaj, nia timo pri serpentoj, vespertoj, araneoj, la halucinoj de la mensaj malsanoj kaj tiuj okazigitaj de la drogoj (kokaino, alkoholo), kiuj aperigas en nia spirito bestojn monstrajn kaj pululantajn, malkovras la ĉieeston de la Besto en nia subkonscio.

La arto kaj la praktikoj magiaj-religiaj de la prahistoriaj tempoj donis la ĉefecon al la besta regno (vegetalo kaj mineralo venis nur poste). Tiam la homo estas ĉasisto kaj fiŝisto, antaŭ ol esti agrokulturanto. Eĉ antaŭ la Aŭstraloidulo, la mekanismo estas ekigita : la perfektigo de la armiloj (unue bastono kaj ŝtono) kaj de la ĉasmetodoj reprezentas intelektan progreson, kiun akompanas kruelaj instinktoj. La ĉasado tiras la homon en unu civilizacio-procezon ; ĝi estas la unua granda epopeo ; ĝi promesas al la homo la konkeron de la mondo. La paleolitikulo, la mezolitikulo ĉasas por la nutraĵo, la vestoj, la ilaro, por la magio. Tial, preskaŭ ekskluzive, la figuraĵoj estas tiuj de bestoj ; tre raraj estas la homaj bildoj. Nur en la neolitiko kun la apero de la potaĵoj, de la kuirado, de la vegetala nutraĵo, la homo komencas atenti la plantojn kaj ilin uzi en la dekoracio. La bestfabelaro instaliĝis en la lingvo, en la kolektiva pensmaniero, en la individua fantazio. La bestoj ilustras ne nur la zodiakon, tiun Vivo-Radon, sed, pere de refiguraĵoj aŭ maskoj, de nutraj interdiktoj (oni ne manĝas viandon en Hindujo kaj ĉe la Pitagoristoj), pere de totemoj, de legendaj metamorfozoj, la homo sin turnas al la bestoj por esprimiĝi kaj komuniki kun si mem ; ĉiutempe la bestoj aperas en la nenombreblaj diaj metamorfozoj, avataroj kaj afliktoj. Preskaŭ 400 specioj ilustras tiujn kredojn kaj enigmojn. Tiu kredo en la metamorfozoj kuniĝas kun la hodiaŭaj sciencaj evoluismaj teorioj laŭ kiuj la bestaj specioj estus promesataj al nenombreblaj mutacioj dum la homa specio estus atinginta sian finan punkton.

Malsovaĝigado de la bestoj

La Diluvo lavis la Teron ; ĝi malaperigis la enormajn bestojn de la antaŭaj tempoj. Tiu Diluvo-mito aperis preskaŭ samtempe en lokoj tre malproksimaj unuj de la aliaj (en Kaldeo, Hindujo, Grekujo ; ĉe la Hebreoj, la Skandinavoj, la Amerikaj Indianoj) Tamen, la sciencistoj asertas, ke, geologie, tiuj fenomenoj (longedaŭraj pluvoj, degelado, sisma ondego) ne povis okazi preskaŭ samtempe en tiuj diversaj lokoj.

La bestaj specioj, kiuj eniris en la Arkon diferenciĝis laŭ la lokoj, laŭ la religioj. Sed iliaj karakteroj estis precizigitaj kaj definitive fiksitaj ; la prahistoriaj monstraj bestoj malaperis en la akvojn. En tiun arkon la bestoj enŝipiĝis kun la homo por longa vojaĝo ; la kunloĝado malpliigis la distancon inter Besto kaj Homo.

Oni trovis du fosiliajn hundojn (datitaj je 8 000 j. ant. K.) : la hundo de la torfoj kaj la similŝakala hundo. La neolitiko havas jam 4-5 hundo-rasojn ; la Egiptujo de la 12-a dinastio (2 000-1 800 ant. K.) havas 7 hundo-rasojn. Fine de la 7-a jarmilo en Anatolio, en Grekujo, la homo allogas al si hundojn, ŝafojn, kaprinojn kaj poste bovidojn kaj ĉevalon. La terciara ĉevalo estis granda kiel hundo. Antaŭ 15 millionoj de jaroj, ĝi atingis la staturon de azeno. Tiuj bestoj, kiel montras ilia nomo venis el Azio. Ilia malsovaĝigado korespondas kun la apero de la agrokulturo, de la potaĵo, de la teksado de fibroj. Tiu malsovaĝigado malaperigis la homajn buĉofe-

rojn. La uzo de la ĉevalo malpliigis la nombron de la sklavoj.

Kelkaj el la bestoj estis ekstermitaj de la homoj ; aliaj estis protektikaj kontraŭ la predantoj ; la ceteraj, kondukitaj al multeformado de la specio pro krucaĵoj naturaj aŭ okazigitaj de la homo.

Longe antaŭ la Libro de la Bestoj de Ambroise Pare kaj la Fabloj de la Fontaine, longe antaŭ la antikva mitologio, la homoj konsideris la bestojn, kiel simbolojn de niaj instinktoj kaj pasioj ; la unuaj gentoj de Afriko kaj Ameriko, kreis la Totemismon. La Totemo estas la intelektigo de la besto bildo. Kun la akvoj de la du Niloj, tiuj totemoj eniris en Egiptujon. La Egiptoj lokis en Horus la dion Nizo, kaj la Tebanoj kultis la krokodilon kaj la serpenton. La egipta ibiso havas la formon de la hieroglifo, kiu signifas la « animo », « la vitala inspiro ». Tiu reprezentado ĝisekstreme elpuriĝas : la kolo, staranta kiel tigo, portas senokulan kapon, la streko desegnas la kropon, la ventron, la voston ; la kruroj estas du rektaj linioj kaj la besto estas ovalo ; tiu ovalo konstituas ĝian nomon.

La Grekoj donis al la dioj homan formon « la plej perfekta » diras Phidia (Fidio). Tamen la bestoj estas iliaj simboloj kaj ilustras ilian karakteron : la aglo de Zeŭso, Cerbero, la trikapa hundo de Hadeso, la kolombo de Afrodita, la virŝafo de Hermeso. Tiu heralda bestaro kompletiĝis laŭlonge de la jaroj. La antikvulo lokis ilin sur siaj ŝildoj por distingiĝi kaj por timigi la malamikojn. La Greka mitologio proponis metamorfozojn al la dioj. Zeŭso iĝas aglo por forporti la junulon Ganimedo, taŭro por forrabi la azian princinon Eŭropa, cigno por posedi Leda. Ofte la dio reprenas sian homan formon por unuiĝi kun sia predo, kiu, cetere, montras nenian reziston. La besta enkorpiĝo alportas al Zeŭso pli fortan virecon, kiu, pro lia intelektiĝo, malpliiĝis ĉe la homo. Io, transformita en bovidinon, Likaono en lupon, Akteono en cervon, najbariĝas kun la hindaj kredoj, laŭ kiuj la homo, post sia morto kaj laŭ siaj pekoj, pasas en beston pli malpli malnoblan. En Grekujo tiu reenkarniĝo estas nur okaza kaj apartenas al la populara fabelo. Eskilo kaj Sofoklo sciigas al ni, ke la liro de Orfeo ĉarmis la bestojn, la arbojn kaj eĉ la montojn. Estas la malnova homa revo pri Paco, Interkompreno kaj Pureco. La mito de Orfeo figuris en la Romaj Katakomboj. La Kristanoj ĝin modifis kaj gardis nur ŝafojn, ŝafinojn kaj kolombojn dolĉajn kaj obeemajn. Orfeo estis la Bona Paŝtisto, kiu kondukas siajn zorgatojn en la ĉielajn ebenaĵojn ; la kolombo restis la graco, la pureco ; la senmakula ŝafido, oferita al la buĉado, de tiam simbolis la Savinton, la Krucumiton.

La greka mitologio, la zoologio de Plinio, la ekstravagancaj rakontoj de la vojaĝantoj, inter kiuj Marko Polo, kaj tiuj de la navigistoj naskigis la fabelajn mezepokajn bestojn, kiuj loĝas en niaj katedraloj : hundkapaj homoj en Vezelay, grifoj en Sens, leono kaj azeno en Chartres. Kontraŭ tiu pagana ikonografio la Eklezio konsideris kelkajn el tiuj bestojn kiel enkorpiĝon de la Malbono : la kaprino estas la voluptamo, la apro estas la kolero, la vulpo estas la subverso kaj la malpieco ; aliaj gardas sian kristan virton : la kolombo, la ŝafido. La Biblio apartigis la bestojn en du kategoriojn : la purajn, la malpurajn.

Dante la granda inspirito de Mezepoko, vidas en la Infero la Reĝolando de la Besto. Cerbero estas la gardisto de tiu nigra ejo, fordonita al la Centaŭroj kaj Harpioj. Doni al torturantoj homan formon estas malpliigi la punon, estas lasi la esperon de kompato ; kun besto nenia interkomprenado estas ebla (dresado de la dogegoj). Sed okazis mirakloj en la arenoj, kie la Romanoj fordonis la kondamnitojn al la sovaĝaj bestoj. Tial la bestoj de Dante tute ne similas la terajn bestojn. Tamen ili havas ankaŭ homajn trajtojn, ĉar estas en la hibrigo, ke la monstreco morala kaj fizika estas la plej granda. Plie la plej multo el tiuj inferaj kreitaĵoj ne havas definitivan formon ; ili estas monstroj en konstanta metamorfozo. La priskribado de la turmentoj puntruditaj al la damnitoj finiĝas per la halucina transformiĝo de viro en serpenton.

La astrologio, inventita de la Babilonanoj, atribuis beston al ĉiu monato de la jaro, al ĉiu el la 12 horoj de la tago, al ĉiu ciklo de 12 jaroj. En la astronomio, ĉiu konstelacio ricevis la nomon de unu mitologia besto.

La klasifikado de la bestoj estis malfacila kaj longe inspiriĝis de la legendoj. Post Plinio, Aristotelo kaj la Mezepoko, la 17-a jarcento konis multajn librojn pri la bestoj. Nia civilizacio multe malfortigis la arkaikajn simbolojn. Tamen, vole-nevole, nia humanisma kulturo nutriĝas je metamorfozoj kaj besteco. La psikologoj, post Freud kaj Jung, retrovas la bestojn en nia subkonscio. La pentrarto, post Jerôme Bosch kaj Panofsky, kun Andre Masson kaj Paul Klee uzas la bestojn por traduki niajn anim-statojn. Jam en la 16-a jarcento, la artistoj miris antaŭ la similaĵoj, kiuj ekzistas inter la homaj vizaĝoj kaj la bestaj kapoj. Ĉu fine la homo similas sian favoratan beston ?

La literaturo kaj la fikcio-scienco inspiriĝas je la Metamorfozoj de Ovidio, je la kontraŭnaturaj rilatoj de Pazifea kun la Taŭro, de Leda kun la cigno, je la Granda Malbona Lupo de Ruĝcapelulineto, je la eleganta rakonto de Cocteau « La Belulino kaj la Besto ».

Certe, se bestaro estas la diversaj portretoj de la homoj, ĝi estas ankaŭ vehiklo inter tri mondoj : la infera, la dia, la homa.

El la libro de P. Gascar

La Homo kaj la Besto

Pri la Olivarbo

(fino)

Tiun pakton miljara la homo perfidis.

En Provenco, la estonto de la olivarbo estis grave minacata. Ĉiuj aŭdis pri tiu regreso, aperinta ekde la mezo de la 19-a jarcento. Antaŭ ducent jaroj, la olivarbo kreskis norden, ĝis Isère. Kaj ne maloftaj estis la vilaĝoj kun dek ĝis tridek muelejoj.

Ni ne ĵetu la ŝtonon al la posedantoj. Estus tro facile. Ekonomio, vole nevole, malmulte rilatas kun moralo. La tempoj ŝanĝiĝis. Oni pli facile kaj alimaniere prilumis la domojn, hejtis ilin, nutris sin. Aliaj oleoj, pli malmultekostaj, kaj pli ŝatataj, anstataŭis la olivan. Eĉ olivoleoj el Hispanujo kaj Nordafriko sukcese konkurencis la Provencan, ankoraŭ produktitan laŭ antikvaj metodoj. La vino vendiĝis pli profitodone, kaj la vito anstataŭis la arbojn. Fine, malbonŝance, la arbo ofte kreskis en lando belega, kie la kvadrata metro baldaŭ atingis fabelan valoron. De ĉio la olivarbo estis la viktimo. Kiam fine alvenis la terura frosto de 1956, la situacio iĝis katastrofa.

Se ni haltus tie-ĉi, nur necesus, kanti ! De Profundis...

Sed ni ne finos tiel funebre. Efektive, de dudek jaroj la afero iom reboniĝis

Pelite de la turisma marbordo, la olivarbo bone tenis sian terenon en la landa interno. La registaro, fine, ekhelpis finance. La produktantoj faris grandegan laboron, flegis la restintajn arbojn, kaj de 1972 rekonkeris sian lokon sur la lokaj Foiroj. La teknikoj moderniĝis. De la « garigo », la arbo descendis al la ebenoj pli riĉaj. La malfido de la konsumantaro kontraŭ nenaturaj produktaĵoj kreskas, kaj la vivnivelo altiĝas : oni do pli volonte konsentas, elspezi por olivoleo. La nacia konsumo de tablolivoj konstante kreskas, kaj la nuna produktado estas tre nesufiĉa enlande : kial do importi, kaj perdi valorajn devizojn ? Intertempe, oni ree eltrovis, ke la olivarbo haltigas la fajregon, kiu estas vere plago en nia regiono.

Paralele okazas, ke multaj kamparaj domoj, — duavicaj rezidejoj —, aperas dise, kaj preskaŭ ĉie la posedantoj, ĉu snobe, ĉu sincere, flegas siajn kelkajn olivarbojn, kaj fieras pri siaj olivioj. Tial refunkciis multaj mueleloj. Ekzemple, apud Draguignan, la muelisto de Fontcabrette (7) reekipas sian muelejon per novaj maŝinoj. Atentu ! Ne temas pri novbakita fabriko. Apud lirlanta rivereto, soleca en la valo, li konservis la grandan padelradon, la lignan dentradaron, kaj la muelŝtonon. « Tion la klientoj ŝatas », li diras. Kaj ili urĝas lin, Belgoj, Nederlandanoj, Lionanoj, kaj aliaj, iuj senpaciencaj. Ili ĉiuj volas ekhavi sian oleon samtempe. Kaj, kvankam la kooperativoj moderniĝis kaj funkcias, multaj kamparanoj retrovis la vojon al la malnova muelejo, ĉar ili deziras ricevi la oleon de **siaj** olivoj.

Ankaŭ Societoj novaj prosperas. En Nyons (Drôme), la Ordeno de la Kavaliroj de l'Olivarbo fondiĝis en 1963. Alia Frataro aperis lastjare en Bargemon (Var). La membroj, solene akceptataj, ĵuras protekti kaj ami la olivarbon, kaj la kutimojn kaj tradiciojn.

La Foiro de l'Olivo, aperinta en Draguignan antaŭ dudekdu jaroj, okazis de tiam ĉiujare, kaj en Februaro okazis en Bargemon la Unua Semajno Oleokultura, kun prelegoj, demonstroj praktikaj ĉiuspecaj, kaj, bela ideo, konkurso de desegnaĵoj kun premioj, por la infanoj, pri la temo « La arĝento frondo ». Ĉie daŭre floras la festoj tradiciaj. Castellar (Alpes-Maritimes) festas la olivon en Majo ; en Julio Bonson kaj Breil-sur-Rayo (Alpes-Maritimes), kaj Nyons (Drôme). En Septembro, Mouriès (Bouches-du-Rhône) festas la verdajn olivojn. Kaj Beaulieu-sur-Mer ĉiujare omaĝas al sia veterana olivarbo, laŭdire miljara. Fine, kiu ne jam konas Cagnes-sur-Mer, nepre iru tien. Apude, oni povas sidi, en Les Colettes, sub la belegaj olivarboj de Renoir. Kaj supre en la kasteleo Grimaldi de la citadelo, eblas viziti la Muzeon de la Olivarbo, kvin ĉambrojn zorge aranĝitajn de la tre klera D.P. Clergue, la muzeestro.

Konklude, pli ŝerceme sed tute ne bagateleme, al la hezitemuloj pri la bonefikoj de l'olivoleo, ni nur aldonos ;

— ke tradicie ĝi kuracas la stomakon, la hepaton, kaj inteston ;

— ke ĝi bremsas la maljuniĝon ;

— ke ĝi kontraŭbatalas la kolesteron ;

— ke ĝi efikas bele kontraŭ la ebrio (preferinde antaŭe...) ;

— ke la Provencaj bonedzinoj, kiam iliaj edzoj atingis la danĝeran kabon de la kvindeka jaro, kutimis printempe trinkigi al ili tizanon de olivfolioj, por venki la impetojn de la « tagmeza demono » ;

— finfine, ke antaŭnelonge serioza seminario de eminentaj sciencistoj unuanime deklaris, ke, inter la grasoj, la « virga » olivoleo, tiu pura fruktosuko, plej proksimas la virinan lakton...

La leganto ne kredu, ke post tiu epilogo la verkinto provos vendi sian oleon. Li posedas tri olivarbojn, cetere junetajn.

Ni ankoraŭ longe sucu tiun lakton, kiu de la plej antikvaj tempoj nutris la civilizon de l'olivarbo. Al la legantaro tiun gracon ni bondeziras. Tiel estu !

J.-P. BEAU.

(7) Gazeto « Le Monde », 10-an Marto 1976, Jean Rambaud.

POR LA PRAKTIKANTOJ

Pluaj paŝoj al plena posedo

de P. BABIN

Lingve aprobita de Franca Esperanto-Instituto

ĵus reeldonita (tria eldono)

Prezo : 18 fkj + afranko

Speciala prezo por mendo de almenaŭ 10 ekzempleroj

POEMOJ (tradukitaj de Jozefo Petrin)

Jean de la Fontaine

LA KORVO KAJ LA VULPO

Mastro la korv' sur arbo lokita,
Plenbekon tenis da fromaĝ'.
Mastro la vulp' per l' odor logita
Parolis laŭ jena lingvaĵ' :
« He ! Saluton, korv' nobela !
Vi aspektas dando ! Kaj tiel bela !
Se via kanto, sen erar'
Similas al via plumar'.
Vi estas feniksa gast' de l' arbar' ».
La korvo ĝojegis je tia vortar' ;
Por pruvi pri l' voĉa belaĵ,
Malfermas bekon, sed falas kaptaĵ'.
La vulpo ĝin prenis kaj diris : « Sinjor' bonul',
Eksciu ke ĉiu flatul'
Vivas je malprofit' de l' aŭskultant' :
L' instru' meritas fromaĝon, sen vant'.
La korvo, pro hont' kaj konfuz',
Juris, sed iom tarde, sin gardi de ruz'.

Guillaume Apollinaire

LA FOIRĴONGLISTOJ

La ĵonglistoj sur glataj terenoj
Pasadas preter ĝardenoj
Antaŭ pordoj de grizaj gastejoj
Tra vilaĝoj sen preĝejoj.
L'infanoj estas frunte irantaj.
La aliaj postsekvas revantaj.
Ĉiu fruktarbo montras rezignon
Se ili de fore faras signon.
Ili havas kestojn aŭ pakegojn
Tamburojn, orumitajn ringegojn.
L' urso kaj la simi', bestoj kun saĝ',
Monerojn kolektas dum la vojaĝ'.

Jean de la Fontaine

LA FUNEBRA CEREMONIO DE LA LEONINO

La Leonvirin' estis mortinta ;
Tuj ĉiu estis alveninta,
Por kvitiĝi kun la princ'
Per kelkaj konsolaj ĝentilaĵoj
Verdire afliktaj troigaĵoj.
Li avertis la subulojn el provinc'
Pri l' tago kaj pri l'loko, kie
Okazos la funebra ceremoni' ; tie
Liaj estroj la solenaĵon ordigos
Kaj la ĉeestantojn lokigos.
Juĝu vi mem, se ĉiu partoprenis.
La princ' al kriegoj sin fordonis
Kaj sia tuta kaverno resonis :
La leonoj ne disponas pri alia templo.
Estis aŭdebla, laŭ lia ekzemplo,
La blekado en dialekt' de sinjoroj korteganoj.
Mi difinas la kortegon regno, kies anoj
Estas plaĉaj al princ', aŭ, se tiel esti ili ne povas
Ili tion almenaŭ ŝajnigi provas,
Popolo trista, gaja, preta je ĉio, je ĉio indiferenta
Popolo kameleona, simia, kun mastro konsenta ;
Oni dirus, ke nur unu spirito decidas pri mil korpoj la [sorton ;
Pro tio la homoj similas simplan risorton.
Por reveni al nia afer',
La Cerv' tute ne ploris. Li ne povis konduti en tiu [manier' :
Ĉi morto lin venĝis : la reĝin' en temp' pasinta
Estis liajn virinon kaj filon gorĝpreminta.
Resume, li tute ne ploris. lu flatul' iris insidi
Kaj asertis, ke li vidis lin ridi.
La reĝa koler', kiel diras Salomon',
Estas terura, kaj precipe tiu de l' reĝ' Leon' ;
Sed la Cerv' ne havis okazon librojn vidi.
La Monark' al li diras : « Mizerul', arbara invitita,
Ci ridas ! Al ĝemetantaj voĉoj ci ne estas konformi [gita.
Ni tute ne uzas por profanaj membroj viaj
Niajn ongegojn sakrajn ! Lupoj ! Ne toleru !
Venĝu la reĝinon : ĉiuj buĉoferu
Tiun trompanton al plejnoblaj prauloj liaj !
La Cerv' tiam replikis : Reĝa Moŝt' ! la temp' por [ploroj
Forpasis ; superflua estas la ĉagren'.
Via digna duono, kuŝanta inter floroj
Al mi montriĝis dum alven'
Kaj mi rekonis ŝin sen pen'.
« Amiko, diris ŝi al mi, l'irantaron vi devas eviti,
Kiam mi iras al Dioj, vi ne verŝu larmojn.
En l' Elizeaj Kampoj mi ĝuis mil ĉarmojn,
Ĉar samsanktuloj al konversacio trudas min inciti.
La reĝon kelke da temp' malespere lasu agiti :
Tio plezurigas min. ». Apenaŭ aŭdigis la diraĵ',
Kaj oni ekkriegis : « Apoteoz' ! Mirindaĵ' ! »
La Cerv' ricevis donacon kaj tute ne estis punita.
Amuzu la reĝon per revoj allogaj,
Flatu lin, pagu lin per agrablaĵoj mensogaj ;
De kiom ajn indigno lia kor' estus plenigita,
Vi estos lia amik' ; la tromp' estos englutita.

Paul Verlaine

JE LUNBRILET'

Je lunbrilet'
Lumas arbar' ;
Ĉiu branĉet'
Alvokas vin...
Ho, amatin'.
Sur la laget'
Spegula klar' ;
Laŭ siluet'
Salikbranĉar'
En plora vent'...
Reva moment'.
Ĉarma aspekt'
De paca sent',
Falas efekt'
De l' firmament' ;
l'iriz' de l' lun...
Ravigas nun.

AUTUNA KANT'

Singulta son'
De violon'
Pluvsezona
Vundas en kor'
Per malhumor'
Monotona
Sufokaplena
Kaj palmiena
Je tiu hor'
Rememora
Pri l' tempo fora
Kaptas min plor'.
Mi ne plu restas
Ĉar la vent' estas
Min kunportanta
En aerofal'
Simile al
Foli' mortanta.

*

Charles Beaudelaire : LA ALBATROSO

Ofte, por amuziĝ, la ŝipa anar'
Kaptas albatrosojn, kunirantojn laŭ vent',
Kiuj sekvas, kiel grandaj birdoj de l' mar'
Post ŝipo, glitanta sur amara torent'.
Apenaŭ de ili metita sur ferdek',
La reĝ' de l' lazur, mallerta, pro humil',
Kompatindas, ĉar la blanka flugileg'
Apude nun trenas, kvazaŭ peza remil'.
La flugant' estas tiel kaduka sur ŝip' !
Li, bela foje, — aĉa, komika jam !
Unu agacas lian bekon per pip',
Alia mimikas kriplulon, per lam'.
La poet' similas al princ' de l' aer :
Tra vent' pasas kaj ridas pri l' arkpafil' ;
Inter mokaj krioj, ekzilita sur ter',
Malhelpas lin marŝi la giganta flugil'.

*

Paul Fort : LA DANCA ROND'

Se l' knabinoj de l' mond'
estus mane-en-man'
ĉirkaŭe de la mar'
estiĝus danca rond'.
Se ĉiu junul' de l' mond'
volus esti ŝipan'
estiĝus el barkĉen'
bela ponto sur ond'.
Tiam ĉirkaŭ la mond'
estiĝus danca rond',
se la homoj de l' mond'
estus mane-en-man'.

MIHAIL EMINESCU *
(1850-1889)

PRETER LA POPLOJ SEN KOMPAR'

Preter la poploj sen kompar'
Pasadis ofte mi ;
Min konis jam ĉiu najbar' —
Malkonis tamen vi.
Fenestrobril' de via dom'
Allogis ofte min ;
Komprenis tion ĉiu hom' —
Vi ne komprenis ĝin.
Respondan flustron sen esper'
Atendis mi de vi ;
El via vic' unu vesper'
Sufiĉus nur por mi ;
Nur horon de amoduet'
Ni estu unu kor',
Ni aŭdu voĉon de l' buŝet'
Kaj mortu post la hor'.
Radion el okulklarec'
Doninte min kun cel'
Sur vojo de la estontec'
Ekbrilu nova stel'.
Vivinta estus vi sen fin'
Dum plura reviviĝ',
Malvarm' de l' man' altirus vin
Majesta ekstonig'
Amata je etern', figur'
Simila en belec'
Feinojn trairantajn nur
El praa antikvec'.
Mi per okuloj sen piec'
Kun ardo amis vin,
Sufer' lasita el praec'
De patro kaj patrin'.
Nun sen bedaŭr' mi sur la voj'
Malofte pasas pli,
Ne gravas ke en van', sen ĝoj'
La kapon turnas vi.
En ago nun kaj en sinten'
Similas ĉiujn vi,
Kun mortokul' kaj sen ĉagren'
Rigardas vin nun mi.
Ekkapti devis vin ĉiel'
Per ĉarmo de l' mister'
Vi nokte lumu per kandel'
La amon sur la ter'.

* **La plej granda rumana poeto.**
Elp. Eminesku



POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

Krucvort-Enigmo

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13
1	L	A	T	R	I	D	E	K	O	K	A	U	N
2	■	L	E	■	D	O	L	A	R	■	T	R	I
3	A	Ŭ	■	L	A	M	■	N	E	K	■	A	V
4	I	N	K	■	R	E	G	A	L	■	A	L	E
5	F	■	I	A	■	N	U	L	■	E	K	■	R
6	O	D	O	R	O	■	T	■	L	O	T	U	S
7	S	I	■	G	R	U	■	V	I	C	■	L	A
8	N	O	M	A	D	■	K	■	M	E	D	O	L
9	E	■	E	N	■	P	O	P	■	N	I	■	A
10	O	A	Z	■	T	A	L	A	R	■	K	O	K
11	T	N	■	K	I	S	■	R	A	B	■	P	O
12	N	A	N	■	E	K	R	A	N	■	S	E	N
13	A	R	E	P	S	E	E	D	O	S	E	R	G

Aldonante la angulajn literojn, niaj legantoj povis mem eltrovi la jenan tekston : La tridek-oka Universala Kongreso de Esperanto en Sofia.

Kvankam nenio indikis tion al ili, ni estas certaj ke niaj legantoj malkovris tiun kaŝitaĵon. Ni ankaŭ estas certaj ke ili bone scias ke la kongreso de Sofia ne estis la 38 a sed 48 a en la listo de la kongresoj de U.E.A., kaj bonvolos senkulpigi la enigmoverkinton pro tiu eraro.

NOVAJ PROBLEMOJ

Du malgrandaj nombroj

Eltrovu du duciferajn nombrojn, sciante ke :

1°) La kvadrato de ilia diferencon estas 529.

2°) La ciferoj de la dekoj estas en la proporcio de 2 al 3.

3°) La cifero de la unoj de unu estas la duoblo de la cifero de la dekoj de la alia.

Trovu la nombron 100

Ĉu vi scios :

1°) Skribi 100 uzante nur 4 foje la saman ciferon ?

2°) Aldoni la dek unuaj ciferojn, kaj trovi 100 uzante ĉiun ciferon nur unu fojon ?

La mistera cifero

Ŝanĝu la literon X per cifero, tiel ke la rezulto de la ĉi-malsupra adicio entenu nur samajn ciferojn.

1	2	3	4	5	6	7	8	9
9	8	7	6	5	4	3	2	1
1	2	3	4	5	6	7	8	9
9	8	7	6	5	4	3	2	1
								X
x	x	x	x	x	x	x	x	x

Alvoko

Nia stoko de ludoj, problemoj, krucvort-enigmoj, ktp... elĉerpiĝas. Ni estus tre dankaj al vi se vi povus sendi al ni novajn problemojn. Bonvolu kunsendi la solvojn, la redakcia komitato estas ĝenerale ne sufiĉe sperta por mem trovi la solvojn de la problemoj, kaj tial ne povas publikigi ilin, se ĝi ne havas la solvojn !

HISTORIETOJ

Konstato :

Estas en Akuŝejo ; du beboj babilas. Unu demandas la alian :

— Kiu ci estas ? Knabo aŭ knabineto ?

— Mi ne scias.

— Atendu, mi tuj diros al ci.

Kaj la unua levprenas la kovrilon de la alia kaj konstatas :

— Ci estas knabeto !

— Ha ! jes ? kiel ci tion divenas ?

— Ĉar ci havas bluajn lanŝuetojn !

Ineco :

Ĉu vi scias, kial Eva manĝis la malpermesitan frukton ?

Nur por la plezuro esti vestita !

GRAMATIKO PER BONHUMORO

AMI-ŜATI (PIV)

Oni amas ĉion, kio plaĉas al la spirito, koro, aŭ sensoj. Oni ŝatas tion, kies valoro oni opinias granda.

— kiel kuracisto mi ŝatas la gad-oleon sed persone ĝin mi tute ne amas.

RIM : pro nacilingvaj kutimoj, multaj uzas **Ŝati** anstataŭ **Ami,** kiam la objekto ne estas personnomo : ŝati kafon, ŝati danci. Tia uzo kvankam ofta estas kontraŭa al la Zamenhofa difino, kaj krome ne kongruas kun la senco de malŝati.

Troriskema



— Certe mi petis de vi, ke vi plej ĉarmaspekte montrigu al mia Direktoro ; certe mi deziras, ke li ŝatu vin ; tamen, kvankam mi tre deziras iĝi Subdirektoro, mi timas ke via vestmaniero instigu lin al postulema amo.

Laboro en ĝojo



— Karulo ! purigante la teleraron, ci devas nepre fajfi ! ne nur por montri kiom ci ŝatas kaj amas tiun manlaboron, sed ankaŭ por ĉarmi cian karan edzinon.

Ĉu malŝato ? ĉu neamo ? ĉu bedaŭro ?



— Mi, principe, neniam tiamaniere kondutus !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (2,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (320 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 500 lires).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Radu Pàtrascu, str. Pompiliu Manoliu 13 Bl. G2 ap. 75-7000 Bukareŝto-39.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Jones R. Kent, 3318 N. Lake Shore Drive, nº 801, CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 1 de 1977, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

La troisième édition de « Por la Praktikantoj » est enfin parue, avec du retard, ce qui ne nous a pas permis de satisfaire les commandes faites en décembre.

Cette troisième édition comporte la correction de quelques fautes qui avaient échappé lors de la seconde, et la couverture, souple, a changé de couleur. Mais le format est resté le même. Evidemment le prix est en augmentation. Cette nouvelle édition de « Por la Praktikantoj » a été décidée par le Conseil d'administration, car le livre ne semble pas avoir trop vieilli et se vend très régulièrement. Un prêt consenti par les membres du Conseil d'administration a permis de ne pas faire supporter une trop lourde charge financière à la M.C.E. Pour alléger encore cette charge, donnez votre préférence aux éditions de la Maison Culturelle. De toute façon, vous ne serez pas déçus, bien au contraire.

Le rythme des inscriptions est pour l'instant celui des années passées. Sauf pour les vacances de printemps qui ne semblent pas attirer la grande foule. C'est dommage, car en plus de la rencontre d'enfants, aura lieu un stage « pédagagie pratique ». Il ne s'agira pas de grandes méthodes d'enseignement qu'il est souvent difficile, malheureusement, d'appliquer en raison d'un manque de moyens matériels, mais des différentes manières d'utiliser le magnétophone, l'image, le tableau de feutre ou tout simplement la voix et le geste. Il n'y aura pas de cours magistraux de pédagogie, mais un échange d'expériences et une application de méthodes. Tous ceux qui font des cours pensent-ils tout savoir ? L'Esperanto ne mérite-t-il pas l'attention que prêtent à l'anglais, l'allemand, le russe, etc., les spécialistes qui enseignent ces langues ?

Combien serons-nous en mars à Grésillon ?

Vous serez des nôtres, bien sûr !

P. BABIN.

LA REVUE

Comme le montre la liste suivante, les abonnements 1977 arrivent à un rythme qui prouve que l'intérêt porté à notre revue ne se dément pas. Mais nous demandons à nos amis une aide simple : en nous envoyant leur réabonnement, ne pourraient-ils pas nous donner l'adresse d'un ou de plusieurs amis qui ne connaissent pas « Kulturaj Kajeroj » ? Ceux-ci recevront un numéro gratuit pour leur permettre de faire connaissance avec notre revue. Merci.

ABONNEMENTS BIENFAITEURS (1976, suite)

J. Fourreau (69)	30,00
G. Rabin (49)	30,00
J. Michau (45)	30,00
Foyer Esperanto Aix (13)	30,00
M. Purschke (All. féd.)	30,00
J. Weidacher (All. féd.)	30,00
H. Rinke (All. féd.)	30,00
H. Wielgus (All. féd.)	80,00
A. Frangeul (49)	30,00
R. Hubert (49)	30,00
B. Popova (Bulgarie)	30,00
H. Karlsson (Suède)	30,00
Centre culturel Tours (37)	30,00
G. Véron (61)	30,00
Total	**470,00**

ABONNEMENTS BIENFAITEURS (1977)

A. Amice (37)	50,00
L. Loyant (56)	30,00
F. Chérault (33)	60,00
C. Duflot (59)	30,00
R. Reynaud (30)	30,00
S. Humm (84)	30,00
D. Laporte (25)	30,00
A. Capus (34)	30,00
E. Noël (76)	60,00
P. Fort (10)	30,00
F. Herbst (All. féd.)	100,00
A. Horault (49)	30,00
M. Binche (37)	30,00
R. Olivaux (44)	30,00
G. Rabin (49)	30,00
R. Lloancy (Tunisie)	30,00
O. Meunier (45)	55,00
D. Bettmann (75)	30,00
E. Eggers (All. fédé.)	50,00
J. Michau (45)	30,00
P. Bourquin (25)	40,00
P. Chatelus (69)	30,00
H. Reymond (13)	30,00
M. Carlué (13)	30,00
M. Bonafous (13)	30,00
J. Martinez (13)	30,00
M. Jullien (13)	30,00
A. Masclet (06)	30,00
C. Jurquet (83)	30,00
F. Bellon (06)	30,00
P. Cavelan (83)	30,00
M. Leclercq (80)	50,00
F. Herbst (All. féd.)	30,00
H. Dieter Hartig (All. féd.)	30,00
F. Garrigue (13)	30,00
D. Jurquet (13)	30,00
J. Villanova (13)	30,00
P. Lorenzin (13)	30,00
J.-P. Beau (13)	30,00
F. Cadenel (13)	30,00
R. Stoffers (13)	30,00
R. Motto (06)	30,00
H. Bourdelon (13)	30,00
P. Bariteaud (06)	30,00
C. Suchareau (75)	30,00
Faculté de Lettres Clermont (63)	30,00
R. Villégier (73)	30,00
P. Métivier (49)	30,00
C. Tuslane (49)	30,00
G. Musset (49)	30,00
H. Génuit (10)	30,00
R. Pons (09)	30,00
A. Mathé (Hongrie)	30,00
A. Boyet (49)	30,00
C. Tissot (42)	50,00
M. Valluet (45)	30,00
M. Soulisse (14)	30,00
A. Diez (34)	30,00
M. Andreasson (Suède)	30,00
J. Trésorier (58)	30,00
Club Retraités Le Mans (72)	30,00
J. Bénistant (72)	30,00
P. Laurent (16)	30,00
A. Gimbert (19)	30,00
G. Prévot (44)	30,00
D. Adnay (Yougoslavie)	30,00
S. Guillot (74)	150,00
R. Laffargue (33)	30,00
H. Karlsson (Suède)	30,00
G. Brousse (75)	30,00
B. Popova (Bulgarie)	30,00
A. Mathé (Hongrie)	30,00
A. Bourry (18)	30,00
R. Lecocq (37)	30,00
G. Clopeau (28)	30,00
M. Ligot (22)	30,00
M. Desnos (53)	30,00
M. Gucz (Pologne)	30,00
G. Lhéritier (92)	30,00
H. Ferrut (25)	50,00
F. Jelenc (86)	30,00
P. Jelenc (Suède)	30,00
Total	**2 840,00**

POR LA PRAKTIKANTOJ
REEDITE

(la 3e édition a été débarrassée des quelques fautes qui subsistaient dans la 2e)

Prix : **18 frs** + frais d'envoi.

(Prix spéciaux à partir de 10 exemplaires)

Commandes à adresser à notre Libro-Servo

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
(Fondateur : H. Micard)
Château de Grésillon - 49150 Baugé

C.C.P. : Nantes 1485-39
Téléphone :
Pâques et été : (41) 89-10-34
Autres périodes : (40) 76-77-95

LA MAISON CULTURELLE

AURA 25 ANS EN 1977 !

PROGRAMME 1977

Pâques :

Arrivée Dimanche 3 Avril — Départ Samedi 9 Avril (après-midi)

— **Rencontre d'enfants (accompagnés d'adultes).**
— **Comment faire un cours ? Pédagogie pratique.**

Eté :

PREMIERE PERIODE (4 - 23 Juillet)

— **Conférences sur des sujets variés.**
— **Discussions.**
— **Activités récréatives.**
— **Excursions.**
— **Pratique de la langue (cours individualisé) (1).**

***Dimanche 3 Juillet* : soirée de contact.**

DEUXIEME PERIODE (25 Juillet - 30 Août)

Arrivée Dimanche 24 Juillet — Départ Samedi 13 Août

— **Cours pour débutants.**
— **Cours de pratique (1).**
— **Cours supérieur.**
— **Activités manuelles.**
— **Excursions.**

TROISIEME PERIODE (15 Août - 3 Septembre)

Arrivée Dimanche 14 Août — Départ Samedi 3 Septembre.

— **Même programme que pour la deuxième période.**

***Dimanche 14 Août* : soirée de contact.**

(1) Les élèves apporteront le manuel qui leur a servi jusqu'alors. Ils pratiqueront la langue à leur propre niveau.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :	
noires :	0,60 F.
couleur :	0,80 F.
Cuillères de colection :	13,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.
Demandez notre catalogue

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin

Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

Quelques livres d'Edmond Privat

Vivo de Zamenhof (10 frs)
Aventuroj de pioniro (12 frs)
Junaĝa verkaro (10 frs)
Karlo (3,50 frs)
Vivo de Gandhi (12 frs)